

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

MUDr. STANISLAV SCHULHOF,

prezidanto de Esperantista Klubo en Pardubice.

La 18an de aŭgusto t. j. mortis en Praha je meningito nia fama poeto kaj verkisto MUDr. Stan. Schulhof, prezidanto de Esperantista Klubo en Pardubice. Li naskiĝis en la jaro 1864 en Lipka apud Trhová Kamenice, studis gimnazion en Rychnov nad Kněžnou kaj universitaton en Praha. Sinsekve li estis kuracisto en Dobruška, Červený Kostelec kaj laste dentisto en Pardubice.

La mortinto estis unu el la ĉefaj Ĉeĥoslovakaj esperantistoj Per sia poemaro »Bohemaj grenatoj«, kie li eminente estas tradukinta antologion el plej bonaj ĉeĥaj verkistoj, li montras al fremdlando esperantista, ke la ĉeĥaj literaturaj »grenatoj« valoras esti enmetitaj en la kronon de la monda literaturo. Liaj originalaj esper. poemaroj: »Per Espero al Despero« 1911, »Kion la Vivo alportis« 1911, kaj »Autunaj Floroj« 1912 troviĝas en la biblioteko de preskaŭ ĉiu fremdlanda esperantisto. Senombraj estas liaj propagandaj artikoloj en la ĉeĥaj kaj eksterlandaj ĵurnaloj kaj tre multaj liaj kursoj.

La esperantista movado ĉeĥa perdas en li honestan pioniron kaj la eksterlandaj samideanoj sinceran amikon, kies nomo kaj laboro restos por ĉiam kunigita kun historio de Esperanto.

Ant. Pitlík,
del. de UEA. en Praha.

B. TITTL:

POR TĚŠÍN.

La Paca konferenco estas solvonta la problemon pri ŝtata aparteneco de tri regionoj: Těšín, Orava kaj Spiš, kiujn pretendas Polio kaj Ĉeĥoslovakio. La ĉefan rolon ludas tie ĉi la regiono de Těšín (germ. Teschen, pole Tienczin), kiu pro siaj riĉaj karbminejoj estas grava faktoro ekonomia.

Tiu ĉiu regiono apartenas jam de multaj jarcentoj al la landoj de bohema krono. Ĝi havas proksimume 1600 km² da surspaco kaj laŭ la aŭstria popolsumigo loĝas tie 77.000 da Germanoj, 120.000 da Ĉeĥoj kaj 233.000 da Poloj.

B. TITTL:

O TĚŠÍN.

Mírová konference má rozřešiti problém příslušnosti tří krajů: těšínského, oravského a spišského, na které činí nároky Polsko i Československá republika. Hlavní úlohu hraje tu Těšínsko, které pro svoje bohatá ložiska uhelná jest důležitým činitelem hospodářským.

Kraj tento patří již po mnoho století k zemi české koruny. Měří asi 1600 km² a dle posledního rakouského sčítání bydlí zde 77.000 Němců, 120.000 Čechů a 233.000 Poláků.

La Paca konferenco sekvante la principojn de Wilson decidis, ke la bohema-pola proceso estu decidita per plebiscito. Sed estas la demando, ĉu pere de la plebiscito oni juĝos juste kaj ĉu ne estas neceso atenti eĉ aliajn cirkonstancojn, kiuj ion komplikas la problemon, sed kies justa prijuĝo estas grava helpanto de la solvado.

La Poloj ne deziras, ke la Paca konferenco konsideru la fakton, ke la perdo de la karbminejoj troviĝantaj en la regiono de Těšín signifus por la Ĉeĥoslovaka respubliko ekonomian katastrofon, tiom pli grandan, ke laŭ la artikolo 68. de la paktkontrakto ĝi estas devigita provizi per karbo eĉ German-Aŭstrian, kvankam ĝiaj propraj fabrikoj — kaŭzo de la karbomanko — ĉesas produkti, ke pro la sama kaŭzo oni en multaj lernejoj ne instruas, urboj estas vualitaj per mallumo, kaj la popolo en siaj hejmoj suferas malvarmon. Se tiu ĉi argumento ne havas sufiĉan gravecon por pravi la necesecon, ke la nomita regiono apartenu al Ĉeĥoslovakio, estas tie ĉi argumento alia, kiun oni devas konsideri:

La nuna nacieca stato en la regiono de Těšín estas la rezulto de la subpremo de la bohema nacio, kiun ĝi suferis de post la batalo sur Blanka monto, ĝi estas frukto de la regado de Habsburgoj. Se oni juĝas kaj decidus laŭ la nuna stato, ĝi estus kvaŭzaŭ aprobo de la eksterma politiko kontraŭbohema.

Ĝis la jaro 1653 regis la oficiala lingvo bohema en la tuta lando kaj bohemaj libroj vekis la popolon el nescio, sed de tiu jaro venadis imperiestraj dragonoj akompanataj de Jezuitoj por serĉi la herezajn librojn bohemajn. Komencis la periodo de terura subpremo nacia, la bohema lingvo estis elĵetita el preĝejoj, lernejoj kaj oficoj, kaj la polaj katolikaj pastroj komencis prediki pole. El Vieno venis germanizado. La influo de pola lingvo komencis penetri eĉ en familiojn kaj sekve de tio malaperadis la bohema elemento. Dum la lastaj jardekoj almiĝis miloj da polaj ministoj kaj tiel la regiono de Těšín ricevis sian nunan aspekton . . .

Ĉi tiun cirkonstancon devas la Paca konferenco prijuĝi, ĉar alie ĝi ne juĝos juste, kaj fari maljuston al la nacio, tiom suferinta, ĝi certe ne volas.

Mírová konference řídící se zásadami stanovenými Wilsonem, rozhodla, aby spolek česko-polský rozřešen byl plebiscitem. Je to ale otázkou, zda na podkladě plebiscitu souzeno bude spravedlivě, a není-li nutné všímnouti si i jiných okolností, které sice problém trochu komplikují, ale jejich správné posouzení jest důležitým pomocníkem řešení.

Poláci si nepřejí, aby mírová konference přihlížela k tomu, že ztráta uhelných dolů nalézajících se na Těšínsku, byla by pro Československou republiku hospodářskou katastrofou, tím větší, že dle 68. článku mírové smlouvy jest nucena zásobovat uhlím i Německé Rakousko, ačkoliv je vlastní továrny — následkem nedostatku uhlí — zastavují výrobu, že z téže příčiny v mnoha školách se nevyučuje, města jsou zahalena ve tmě a lid ve svých domovech trpí zimou. Pakliže tento důvod nepovažuje se za dosti závažný, aby dokázal nevhodnost příslušnosti jmenovaného kraje k Československé republice, jest zde důvod jiný, který nutno vzít v úvahu:

Nynější národnostní poměr v Těšínsku jest výslednicí útisku českého národa, který trpěl od bitvy na Bílé Hoře, jest plodem vlády Habsburků. Kdyby souzeno a rozhodováno bylo dle stavu nynějšího, bylo by to schválením vyhlazovací politiky protičeské.

Až do roku 1653 vládla česká úřední řeč ština v celé zemi a české knihy budily lid z nevědomosti, ale od toho roku přicházeli císařští dragouni, doprovázeni jezuity, aby hledali kacířské knihy české. Nastala doba hrozného porobu národní, čeština byla vyhazována z kostelů, škol i úřadů a polští katolíci kněží počali kázati polsky. Z Vídně přišla germanisace. Vliv polštiny počal vnikati i do rodin a v důsledku toho český živel zanikal. Během posledních desetiletí přistěhovali se tisíce polských horníků a tak dostalo Těšínsko své nynější vzezření.

Tuto okolnost musí mírová konference posouditi, protože jinak nesoudila by spravedlivě, a dělati příkoří národu, jenž tolik vytrpěl, jistě nechce.

Subleŭtenanto Miloš Lukáš:

MORTIS NIA POETO...

De la altaĵo Parnasa depaŝu, ho Muzoj,
malsupren,
Rozojn elplektu el haroj kaj ilin en maron
forĵetu,
Orajn demetu ornamojn, kaj plendu kaj
ploru maldolĉe!

Sciu, ke krevis la kordoj sur liro de nobla
poeto,
Tiom de vi favorita kaj tiom de ni adorata;
Aŭdu, Parnasaj diinoj, la vorton teruran
li mortis! —
Ne plu eksonos la liro, ne plu la amata
kantisto
Inter diversaj popoloj aŭdigos en rimoj
sonoraj
Siajn dezirojn kaj revojn; li mortis, li ĉesis
prediki
La plej majestan ideon pri paco, konkordo
kaj amo
Al la tutmonda homaro, kaj pri reciproka
fratiĝo;
Vane sopiros ni ĉiuj — li mortis, li ne plu
revenos...

Sed la fervora laboro, al kiu li vivon
dediĉis,
Certe ne restos sen fruktoj: Ni ĵuras, ke ni
ĝin daŭrigos.
Hereditaĵo ĝi estas, kaj ni ĝin ne lasos
perei.
Unu nur celon ni konos: konduki sub
verdan standardon
La dividitajn naciojn kaj ilin instrui pri
amo. —
Ho, vi mortinta kantisto, per via subita
foriro
Orfoj ni ĉiuj fariĝis; sed ĉiam el viaj
poemoj
Forton ni ĉerpos, kuraĝon — kaj kredon,
ke fine ni venkos!

Dr. MIROSLAV TYRŠ.

(Al 35 jara datreveno de l'morto
de Sokolara gvidisto.)

La 8. de aŭgusto estas de post la jaro 1884 — la mortjaro de Tyrš — la nigra tago en la sokolaro. Nunjare ni ekmemoras dron. Tyrš pli profunde kaj signifplene. La spiro de Libereco faras miraklojn. La nunjara datreveno mildigas la suferojn de militjaroj, ke super niaj kapoj flirtas la venka standardo kaj ke la ideoj de Tyrš kaj Fügner fariĝis fundamento por fondado de ĉeĥa ŝtato.

Tyrš estis de sia junaĝo eksterordinara aperaĵo. Kvankam ne plensana, li sola kuraĝis en la jaro 1850 kontraŭ la volo de ĉiuj profesoroj fari la maturekzamenon en lingvo ĉeĥa. Kiel universitata studento li estis idealisto kaj diligenta laboranto. Antaŭ liaj okuloj aperis jam tiam la zorgo pri la tuta nacio. Pro tio li klopodis akiri instruistan oficion en universitato. La Germanoj malebligis lian projekton. La nacia movado de sesa jardeko rekompencis lin. Li prokrastis sian sciencan programon kaj eniris en la vicon de patrujaj organizantoj kaj batalantoj. Li anoncis sian aktivan laboron kaj komencis kun Fügner la verkon je propra risko.

Tyrš donis al Sokol organizacion kaj evoluajn rimedojn laŭ metodo de scienca laboro. Li kreis propran gimnastikan sistemon kaj fondis en la jaro 1871 la gazeton »Sokol«. Niajn etajn rilatojn li volis vivigi per monda movado, konstanta facilmoveco, vigleco kaj spriteco. Oni povas nomi lin fondinto de ĉeĥa »amerikanismo«. Sed Amerikano estis Tyrš ankaŭ per siaj demokratiaj principoj por detruado de klasoj kaj kastoj, per direktado de intereso al pli altaj vivotaskoj.

Antaŭ 50 jaroj li predikis tiel kaj ĉiujn faktojn li efektivigadis per pionira laboro, kiu moligas grundon kaj naskas tendencojn je socialaj reformoj. Ekvidinte okaze de la unua kongreso en la jaro 1882 la rezulton de sia agado, li sciis jam klare, ke li ne laboris vane. Ideoj lia kaj de Fügner enradikiĝis kaj la popolo mem nutris ĝin per sia sango. Eĉ tio estis senduba, ke la Sokolaro estas kapabla fariĝi kultura kaj internacie-politika kontaktilo inter Slavoj kaj doni fundamenton por ilia unuigo en organizacio de justa kaj pura homamo, liberiĝo el sklaveco kaj egalrajteco en la vico de aliaj nacioj.

Celoj de Tyrš ne konis malvastan horizonton kaj sciis elĉerpadi ĉiujn sferojn de l'homa agado. Li estis natura nacia politikisto kaj apud Havlíček, la dua plej bona ĉeĥa organizanto de popolamasoj, eble en la tuta XIX. centjaro. Idealoj de l'hono estas natura kerno de sokoleco. Malgraŭ tio Tyrš neniam hezitis en decida momento fidi al forta brako. En lia kapo naskiĝis la ideo de defendaj legioj sokolaj kontraŭ la nacia subpremo jam en la jaro 1866, kiam la Prusoj aperis antaŭ niaj limaj montpasejoj. La devo de ĉiu sokolano estas, esti modela, honesta ŝtatano kaj laborema homo. Liaj faroj devas esti imitindaj kaj en harmonio kun interesoj tutnaciaj.

Sokolaro estis ĝis nun nacia memhela institucio revolucia. De nun ĝi komencas

la duan epokon de sia agado, laboron ŝtat-krean, defendan kaj edukan.

Kun respekto kaj emocio la tuta nacio rememoris la grandiozan verkon de sia neforgesebla nacia heroo.

Laŭ Dr. K. Horain
tradukis Ant. Kudela.

Jan Klvaňa:

NIA SLOVAKIO.

Sub la gardo de malserenigitaj rokaj pintoj de Tatroj, el malmola granito konstruitaj, etendas sin preskaŭ ĝis Budapeŝto nia Slovakio. De la limilo de Moravio kaj Aŭstrio ĝis Prešov kaj Košice oni ekaŭdas la molan, belsonan slavan lingvon, al kiu nia lingvo similas kiel fratino fratino.

Tiu — ĉi vasta slovakia regiono estas pli grandparte montriĉa. Monto amasiĝas tie — ĉi al monto pli kaj pli alten ĝis tien, kie la kreskaĵaro sur senarabaj dorsoj de Tatroj tute ĉesas kaj la neĝo en altaj valoj dum la tuta jaro konserviĝas. Nur en la river-regiono de meza kaj malsupra Váho, ĉe la malsupra fluo de Nitra kaj Hron'o kaj proksime de la rivero Morava la lando estas ebena kaj diversloke eĉ tre frukto dona. Cetere nur montaraj valoj aŭ basenoj, nur lando por la vojaĝanto eble interesa, sed por siaj loĝantoj malriĉa, mizera.

Kaj tamen amas la slovakia popolo senmezure sian patrolandon. Eĉ se malriĉa dratumisto for de Trenĉin en malproksima fremdlando bone fartus, tamen li rememoriĝas kun amo kaj entuziasmo pri sia naskiĝlando; ŝparinte poste iom da mono, li rapidas al tiuj karaj malaltaj kabanejoj, de kiuj nur pro malriĉeco li devis disiĝi.

Por impresbla animo nia Slovakio estas nekutime ĉarma lando. Ĝis 2600 m super maro leviĝas sur la limito griza baro de Altaj Tatroj. Nitraj kaj Liptovaj montoj, Malgranda Tatro (Slovaka Minajmontaro) estas iom pli malaltaj. En tiu-ĉi regiono estas dissemataj centoj da interesaj vilaĝoj, multe da belaj urboj kaj ankoraŭ pli multe da memorindaj, kvankam duone ruinigitaj kasteloj, el kiuj la plej grandaj kaj plej kuriozaj estas: Trenĉin, Orava, Muráň. El la urboj estu rememorigataj sv. Martin, Kremnice, Št'ávnice, Báňská Bystrice, Košice kaj Prešov. Sed escepte eble nur Turĉ. sv. Martin la slovakaj ur-

boj estis madjarigitaj. Kremnice, Št'ávnice, Báňská Bystrice, eminentaj urboj minejaj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj havas multe da germana loĝantaro. En la mineja distrikto de Spiš la germanaj vilaĝoj superas la slovakajn.

Nia Slovakio ne estas nur riĉa je rokaro, ĝi havas ankaŭ multon da utilegaj mineraloj, precipe minaĵojn, arĝenton kaj oron. Kaj pro siaj feraj kaj kupraj minaĵoj, pro oro kaj arĝento, la Slovakio estis vivigita jam en pratempoj. Precipe interesaj estas ankaŭ grandegaj tavoloj de kalkŝtono en orienta Slovakio enhavantaj multon da grandegaj grotoj, el kiuj la plej fama estas la groto de Dobšín, plenigita de belaj stalaktitoj kaj stalagmitoj glaciaj.

Gravaj estas en Slovakio multenombraj kuracaj fontoj. Bonegaj acidaj akvoj superas kaj eble ne estas valetoj, kie ne ekzistus iu-ajn. Precipe memorindaj estas varmaj akvoj sulfozaj, per kiuj oni sanigas podagron, artriteton kaj similajn malsanojn. La plej eminentaj el ili estas la banlokoj Teplice apud Trenĉin kaj Pišťany apud Váh'o.

La riĉeco de Slovakio eĉ en regno de kreskaĵaro ne estas malgranda. Arbaroj profundaj, maljunaj kovras eble pli multe ol trionon de la tuta regiono kaj sur Váh'o, Nitra kaj Hron'o oni flosigas multegon da ligno brulaĵa kaj konstrua. La ĉefa posteno de komerco kun ligno apud Váh'o estas Žilina. La ebenaj regionoj slovakaj kulturata grenon de ĉiu speco, precipe maizon. Sed ankaŭ vino tie-ĉi kaj tie prosperas bonege, precipe en la ĉirkaŭaĵo de Bratislava. En »malsupra lando« estas riĉa ankaŭ la fruktokulturado, kontraŭe inter la montoj oni rikoltas nur terpomojn, fagopuzon kaj avenon. Tie la popolo sin rifuĝas al bredo de ŝafoj kaj nome en la maniero de alpaj paŝtistoj, kiel pro viando kaj lano, tiel pro fromaĝo. Eminentata estas la »brynza« el la distrikto de Liptov, mondkonata kiel Liptova fromaĝo. Diversloke oni fumaĝas ĝin kaj nomas »oŝtiepky«.

Slovakio havas abunde da ĉasaĵo. Sur la Tatroj troviĝas eĉ ĉamo. El rabaj bestoj aperas de tempo al tempo la urso, lupoj kaj linko; sed ili estas danĝeraj por homo nur dum la plej akra vintro.

Literatura lingvo de Slovakioj estis dum longa tempo la ĉeĥa lingvo kaj ĝi estas ĝis nun en iaj lokoj eklezia lingvo. Nur en la pasinta jarcento fondiĝis la literatura slo-

vaka lingvo, plena da antikvaj vortoj kaj formoj. La popola lingvo ne estas ĉiuloke la sama, en diversaj regionoj la popolo parolas per malsamaj dialektoj.

La Slovaka popolo vestas sin ankaŭ diversmaniere. Malsimpla estas la kostumo en la distriktoj de Bratislava kaj Nitra, simpla en la montaj regionoj interlandaj. Enĉiĉmany apud Rájec kaj en Dětva ĝi estas plej antikva. Tie-ĉi, en Dětva, la maljunaj viroj portadas ankoraŭ harojn sur tempioj, iam eĉ sur la nuko kunplektitajn, kio estas certe praslava maniero.

La slovakaĵoj loĝejoj estas plej ofte malriĉaj, ofte lignaj, kaj la vivado en ili sufiĉe malĝoja. La slovaka popolo ja havis ĝis nun nenie proprajn mezajn lernejojn, nek industriajn nek agronomiajn kaj tiel ĝi restis sur la sama stadio, sur kiu ĝi estis antaŭ jarcentoj, mizera, malriĉa. (Rimarĉo: Lastatempe estis malfermitaj multaj lernejoj, ekzemple gimnazio en Ružomberok k. t. p.) Kaj tamen la popolo estas klopodema, talenta, sprita. El ĝi eliris multe da eminentoj viroj, poetoj, aristoj kaj scienculoj. Tie-ĉi naskiĝis la eminenta pentristo Kupecký kiu vivis en la 18 a jarcento; tie-ĉi naskiĝis P. Jos. Šafařík, fama esploristo en slavaj antikvaĵoj de mondkonata nomo, la poetoj Kollár, Holý, Chalúpka, Sládkovič, Hurbau-Vajanský, Hviezdoslav kaj aliaj.

Ĉe tagiĝo de slava epoko, en tempo de grandmoravia regno, la Slovakio apartenis al Moravio. Sed post la falo de grandmoravia regno en jaro 907 ĝi estis aljuĝita al Hungario en jaro 1031 kaj restis tie ĝis tutmonda milito. La nobelaro kaj landbienularo madjariĝis kaj tiel restis tie nur la popolo, kiu konservis sian antikvan gracian lingvon.

Donu Dio, ke tiu-ĉi popolo en nia ĉeĥoslovaka ŝtato akiru sian valoron kaj pli grandan klarecon kaj tiel emancipu sin el nuna submetiĝo kaj mizero.

El ĉeĥa lingvo tradukis
Marie Havránková.
(Prostějov.)

MUK.

Ĉeĥe verkis Růžena Svobodová.

Pentristo Schwaiger foje desegnis bildojn al arabaj fabeloj. Unu el ili prezentis malgrandan Arabon, kun turbano sur la kapo, armitan kaj marŝantan tien kaj ĉi tien preter kastela portalo. Tio estis pigmea vireto kun grandega kapo, kun maljuniĝinta vango kaj estis nomata Muk.

Ekloĝis al ni en la saman straton malriĉa virino kun malgranda filineto. Ŝi estis vendistino, ŝi foriradis por la tuto tago post sia okupo kaj ŝia infano kun maljunula vizaĝo, portante peze grandan kapon sur malgrasaj ŝultroj, sidadis sur la ŝtona sojlo de la malnova dometo. Mi rememorigis pri »Muk« de Schwaiger kaj la desegnaĵo kunfandiĝis en imago kun la eta kompatinda filineto, kiun la patro estis forpelinta samtempe kun la patrino, ĉar ŝi estis malbela kaj malsana.

Mi konatiĝis kun la knabineto kaj invitis ŝin al mi. Ŝi rakontadis al mi siajn strangajn imagojn. Ĉiutage ŝi atendis grandajn militojn.

»Unu foje ni vekigiĝos«, ŝi diris, »kaj ĉevaloj rigardos en niajn fenestrojn. Militistaroj preteriros kaj post ilia foriro ĉio aliformiĝos. Ni ne estos plu malriĉaj kaj ni manĝos du fojojn tage«.

Ŝi revis pri ia glora savo el sia malĝoja korpeco.

Mi venigadis la knabineton al mi, legadis al ŝi fabelojn de Andersen, nome fabelon pri ĝiba infano, de kiu forfalas la skvamo kaj flugiloj ekaperis, kiuj alportis ĝin ĉielen.

Ŝi ne aŭskultadis ĉi tiun belan sentimentalajon, sed ŝi sopiris:

»Mi havas altajn salonojn, sed ni nur malaltajn. Kiam mi estos aĝa, mi iros servi ĉe Vi kiel servistino kaj tiel ankaŭ mi ekloĝos la altplafonajn ĉambrojn. Sed antaŭ tiu tempo venos grandaj militoj kaj oni mortigos Vin, ĉar Vi havas altajn salonojn kaj ni malaltajn, oni forprenos de Vi ĉion kaj donos al ni. Tion oni nomas justeco! Kaj mia patrino ne sidados plu sur la foiro en malvarmo kaj frosto, en Viaj ĉambroj ŝi estos!

Muk parolis kun ekrideto glacie gravurita ĉirkaŭ la lipoj amase kuntiritaj.

Je la Kristkorpa festo ŝi vendadis sur la placo de Hradčany florkronetojn vinditajn el roza kratago. Kiam ŝi poste venis al mi, ŝi diris:

»Tie estis ankaŭ unu ĝiba knabineto. Ŝi surhavis blankan silkan robon. La virinoj diris, ke la patrino rekudris ĝin por ŝi el sia edziĝifesta robo por kaŝi ŝian ĝibon. Ho ve, mi dezirus havi alian korpon! Mi ankaŭ estas kriplulo! Oni kriis tion je mi!«

Ŝi ekploris. Kaj la ploro krakis en ŝia mallarĝa elstaranta brusto kiel pizgrajnoj en fadenbulo.

En vintro ili gluis kun la patrino pape-rajn ĉenojn kaj poste dum kristnaskaj tagoj ili vendis ilin starante sub arkaĵoj.

»Ĉenoj por fremdaj kristnaskaj arboj!« diris Muk.

Mi forloĝiĝis el ŝia strato kaj en la nova loĝejo mi trovis novajn malgrandajn amikinojn, sed eble ankoraŭ pli grandajn suferantinojn.

Poste ankaŭ Muk forloĝiĝis kaj tiel ni ambaŭ perdiĝis.

Sed foje vespere en vintro venis al mi fremda knabineto proksimume deksejara, ia nesufiĉe nutrita kompatindulo, kaj diris, ke ŝi estis serĉinta min tra la tuta Praha.

»Mi ĝojas, ke mi trovas Vin. Sinjorino Stanclová petas Vin, ke Vi venu al ŝi, ĉar Marinjo tre malsanas.«

Mi sciis nek kiu estas Marinjo nek kiu estas sinjorino Stanclová.

»Ili loĝis najbare de Vi. Marinjo vizitadis Vin kaj nune ŝi senĉese Vin vokas kaj deziras vidi Vin.«

Marinjo do estis Muk.

Mi iris kun la knabino en mallarĝajn stratetojn de la Malnova urbo, en ian profundan korton de nigra domo, mi malsupreniris tra mallumo en kelan loĝejon kun malseketaj muroj de ŝtuparo, sur kiuj mi palpis por iel malsupreniri al pordo, kiun fine la knabino malfermis antaŭ mi trovinte ĝin. Sed en la ĉambro mem la ŝtuparo daŭriĝis. Mi malsupreniris sur ĝi kaj ektriviĝis en ĉambro kun fenestroj sub la plafono mem, lumigata per petrola fumbulanta lampeto, loĝata de du familioj, partigita per nevidebla linio en du loĝejojn.

En la parto apud la forno sur la lito kovrita de disĵetitaj nepuraj kusenegoj genuiĝis Muk. La kompatinda knabineto havis ŝvelintan korpon, la ventron plenvolitan kiel ĉe la hidropsuloj, ŝiaj vangoj estis bluetaj kaj kvazaŭ mirigitaj per la propra nesuferebla doloro.

Ŝi diris: »Patrino mia, prunedonu al mi Vian brakon, por ke mi tie ripozu.

Ŝi ekkonis min kaj malsereniĝis pli ankoraŭ pro sufero.

»Mi sendis serĉi Vin. Mi deziras vidi Vin. Mi volus ke iu metu florkronon sur mian ĉerkon. Neniu posedas monon. La patrino fordonis ĉion en apotekon. Kaj mi estas mortonta. Mi ne ĝisatendos kion mi volis ĝisatendi. Tial mi volas almenaŭ kronon el belaj floroj!«

Ŝi ekploris pro doloro kiu atakis ŝin kaj devis eksilenti.

Ŝia malgranda flava patrineto ploris.

»La bona Dio donis al mi kriplulinon, sed almenaŭ ŝin mi havis. Kaj depost nune mi restos forlasita! Kaj kiom ŝi suferas, kompatindulino, kiom ŝi suferas! La Sinjoro bonvolu ŝin senŝarĝigi!«

Muk iom rekonsciiĝis, rektiĝis en siaj malpuraj ĉifitaj kusenegoj kaj peze spirante post ĉiu vorto per voĉo rauka pro brusta malsamo kaj tremante pro larmoj ŝi diris:

»Kaj krome — donu al mia patrino — kvin florenojn — por aĉeti tombon. — Vi komprenas — kial mi deziras — propran tombon? — Mi ne volas esti — en komuna tombo — kaj unu fojon — tio estos baldaŭ — kiam ĉio ŝanĝiĝos kaj pliboniĝos — venu tien — kaj sciigu min — pri tio, venu — mi petas — sciigi min pri tio; tie en ko-mu-na tom-bo — mi eble ne aŭ-dus — ke ekzistas jam justeco en la mondo.«

La malgranda Muk en tiu momento mortis.

*

La eta Muk havas en tombejo de Olšany sian verdan tombon kun surskribo. Vico da kandletoj brulas tie ofte kaj dum la kristnaskaj festoj ŝi havas ankaŭ malmultekostan piceon plenan da paperaj ĉenetoj. Kiam ajn mi haltas apud ŝi, ŝajnas al mi, ke ŝi atendas, ke ŝi atentege aŭskultas — kaj atendas. Kaj mi havas nemon por diri al ŝi.

Tradukis Rudolf Fridrich.

D-ro Stanislav Kamaryt:

NEMORTEBLA VIVO.

Mirinda estas forto de la homa intelekto. Ĝi kreis ne sole la civilizacion, kiu faras la vivon ĉiam pli agrabla al la ĉiam pli granda plimulto. Ĝi eĉ trovis la leĝojn de tiu mirinda kaj aminda vivo. Ĝi eĉ trovis, ke la trovitaj leĝoj de la vivo ne estas veraj fiksjaj leĝoj de la vivo, sed leĝoj donitaj al ĝi per la intelekto mem. Ĝi do eĉ konstruis leĝojn de la vivo. Ĝi eĉ trovis leĝojn de sia esplorado. Ĝi trovis, ke la leĝoj ne enestas en la esplorado mem, sed ke ili estas enmetitaj en ĝin per la propra intelekto. Ĝi pruvis per raciaj argumentoj, ke ĉiuj leĝoj estas faritaĵoj de ĝi mem artfaktoj de la intelekto.

Kaj ĝi pruvis ke ĵus pro tio ili estas absolute kredindaj, absolute veraj.

La silogismoj estas delikata armilo. Sed la homa intelekto nulligis per ili Diojn de Olimpo, Kriston el la lasta jarcento, Budhon el Ĥinio.

Ĝi pruvis, ke ĉiuj Dioj estas kunigo de bonaj plaĉantaj kaj dezirataj homaj kvalitoj. Nomon ĝi trovis por tiu kunigo: antropomorfismo.

Ne estas la antropomorfismo lasta, kiun ĝi forigis. Hodiaŭ ĝi forigas la pluan:

Ĉiuj homoj mortas. Tial ili kredas, ke ankaŭ la tuta mondo mortos. Ili kredas je fino de la mondo.

Kredo danĝera! Feliĉe sole simpla kredo. Jam nur unusola teorio, teorio pri la entropio antaŭdiras per sciencaj metodoj finon de la mondo. Sed multiĝas filozofoj, kiuj proklamas teorion pri energio, kies sekvo kaj argumento estas la leĝo pri kreskanta entropio, kiel finantan sian uzeblon.

Sekve ne estas racia argumento por kredi la finon de la mondo. Kaj la intelekto ne povas agi alie ol malpermesi kredi plu je ĝia fino. Ĉar por bone vivi estas bezona kredo, ke la vivo daŭras eterne.

Ĝoju, kamaradoj, ĉar malofte vi aŭdas pli agrablan novaĵon: la mondo kun siaj ĝojo kaj malĝojo estas nemortebla. Kvalkam la intelekto estas malavara disdonanto de la ĝojindaj, tamen tre malofte ĝi donacas al vi donacon tiel dolĉan, kiel la proklamita tezo.

PRI UNU SILENTA LABORO.

Antaŭ kelke da jaroj aperis en iu numero de la bonega revuo »Český esperantista« malgranda artikolo, skribita de nia iama fervora propagandisto So. H. K. Bouška. La sama priskribis en ĝi la surprizigan por li fakton, ke la juna filineto de estimataj gesinjoroj Kraus en Praha tiel bone parolas nian lingvon. Kaj la samon oni ĝoje konstatis ankoraŭ pri du knabetoj, ankaŭ Prahanoj, nome pri sinjoretaj Novák kaj Farník.

Certe tio estis ĝojinda afero, des pli, ju pli oni pridubas la utilecon instrui Esperanton al la infanoj.

Pro tio mi ne povas silenti pri la fakto kiu same kortuŝis kaj surprizis min dum la ĵus pasinta libertempo, kiun mi travivis en urbo Červený Kostelec. Tie ne estas ia oficiale starigita esperantista grupo, sed sub la senlaca gvidado de Sino B. Keyzlarová kunvenadas jam dum kelke da jaroj samideaninoj, kiuj, kvankam ne multaj, tamen ne ĉesas pli perfektigadi sin en la diversmaniera uzado de la lingvo.

Memkompreneble, ke mi dum mia ĉesto vizitas ilian »unuigon« kaj la horoj, inter ili travivitaj, estos por mi neforgeblaj. Kaj ĵus ĉi tiu jare mi ekkonis inter ili ankaŭ unu junan samideaninon, la 14aĝan Anjon Šraibrová, kiu vere, mi rajte povas tion diri, parolas nian lingvon flue! Multaj, multaj de niaj pliaĝaj »esperantistoj« devus honti pro sia nescio, aŭdante tiun knabinecon esperante paroli!

Kia estis celo de tiuj ĉi linioj?

Danki al la modestaj kaj diligentaj samcelaninoj de Červený Kostelec pro la ĝojo, kiun ili preparis al mia samideana koro per sia persista laboro kaj ankaŭ peti mi volus ĉiujn, kiuj ekkomencis aŭ studi Esperanton, aŭ propagandi ĝin, ke ili ne ĉesu, ke ili imitu kaj sekvu la laudindan ekzemplon kaj ke ni ĉiuj volu lerni, lerni kaj denove lerni!

Julie Šupichová.

ATENTU!

Senpere antaŭ la redakcia fermo de tiu ĉi kajero estis al ni prezentita letero, kiu estas nova modelo de idista insidemo, celanta al la subfoso de nia movado.

La letero havas paralele esp. kaj idan tekstojn kaj ĝia aŭtoro, Hans Götzendorfer el Weibern en Aŭstrio, volas komenci per ĝi korespondadon kun niaj samideanoj, kies adresojn li prenas el esperantaj gazetoj. En la unua parto de la letero li parolas pri la mondmilito, kiun li kondamnas (mi vetus, ke en ĝia unua stato li estis ĝia entuziasma adoranto) kaj li petas juĝan pri ĝi. Subite de sub tiu ĉi kovrilo Hans Götzendorfer elŝovas la ĉefan intencon: Li sciigas, ke antaŭ jaroj li tre malamis Idon, ĉar esperantaj gazetoj enpresas nur malfavorajn juĝojn pri ĝi, sed kiam li ricevis idan libreton — »yen, mea okuli aperteskis: ca linguo — plezis a me, nam lu esas ciencias reformita . . . Nun me preferas Ido guankam me esis dum 11 yari entuziasmoza Esperantisto. Nun audez, me deziras, ke anke altra samideani konoceskez Ido, por ke la prejudikoza ed energidisipiva disputi inter Ido ed E. cesez maxim balde posible.« — Tiel bele estas dirita per »maxim ciencias linguo« la ĉefa intenco de Hans Götzendorfer, kiu en la fino de sia letero kaŝe kulpigas esp. gazetojn, ke ili trompas sian legantaron, ĉar ili en malbona intenco skribas pri Ido, sed ne enpresas idan tekston.

Jen la ekzemplo de la rekomenciĝanta »laboro« de idistoj, ekzemplo, kiu vokas, ke ni bone observu la agadon de tiuj senkonsciaj fanatikuloj, kiuj jam tiom malutilis la ideon pri komuna mondlingvo.

Mi tre bedaŭras la liniojn, kiujn mi devas dediĉi al Ido, ĉar miaflanke mi fiuzas kun ĝi unufoje por ĉiam. Sed mi sentas la devon informi la novajn samideanojn, kiuj eble estos ankaŭ atakitaj de iu Hans

Götzendorfer, kaj kiuj eble miras, kial ni ne parolas pri Ido kaj pri aliaj ŝanĝprojektoj.

Ni ne faras tion, — ne pro tio, ke ni blinde kaj senpripense adorus la verkon de Zamenhof, ankaŭ ne pro tio, ke kiu ajn komparo estus por ni danĝera, kiel la idistoj ĉiam asertas — sed ĉar ni spertis, ke sole la unueco kaj disciplino de ĉiuj propagandistoj de la lingvo internacia venkos la mondlingvan problemon, sed ne tiu aŭ alia gramatika detalo, pri kies absoluta perfekteco cetere la mondo ĉiam disputos. Nur pro nia unueco atingis la mondlingvosian nunan bonstaton, nur per nia komuna kaj disciplinita laboro ni venkos. Esperanto disvastiĝis tiel, ke ĝi estas praktika helpilo por ĉiu kultura homo. Kaj Ido? Ĝia stato estas ĉiam preskaŭ la sama. Se ĝi estus pruvinta, ke per la reformoj ni pli rapide kaj facile atingos nian celon, tiam certe nun ekzistus eĉ ne unu »fundamentisto«.

Dum sia dekdu jara ekzisto pruvis Ido sole tion, ke ĉiu ajn reformado estas antaŭtempa kaj malutila. Ido nenie akcelis la mondlingvan movadon, kontraŭe, kie ĝi aperis, tie ĝi alportis malutilon. Tial ĉiu tiel nomata »reformanto« — egale, ĉu li estas partiano de Ido, aŭ de la projekto de Saussure eĉ aliaj — estas nura malhelpanto kaj malamiko de la mondlingva movado kaj laŭ tio ni ilin juĝu.

Ili rekomencas sian »kulturan« laboron per la persistemo inda de pli bona afero, ili celas senkreditigi nian movadon kaj tial mi diras: bone ilin atentui!

B. Tittl.

PRI KIO LA ESPERANTAJ GAZETOJ SKRIBU?

»Jen demando!« Diros niaj samideanoj. »ĉion kio povas interesi la esperantistojn.« Mi bone scias, ke la esperantistojn povas ĉio interesi, ĉar ili estas ja tre diverssferaj, komercistoj kaj sciencistoj, metiistoj kaj instruistoj. Sed precize tial la esperantaj gazetoj devas skribadi pri io alia ol ĉiuj aliaj gazetoj. Antaŭ ĉio ili devas alportadi la plej esperantajjn sciigojn, la plej freŝajn kaj la plej utilajn.

En tiu ĉi tempo eble la plej utilaj estus mallongaj raportoj el esperantaj vojaĝoj: nun okazas tre multaj vojaĝoj en nia centra Eŭropo, alvenadas tre multaj frem-

duloj, kiuj ne povas aŭ povas nur tre malfacile interkompreniĝadi kun ni; estus da eble al la mondo, kiu tion, kion ni klare vidas kaj kion ni bonege klopodas evitigi, ignoras kaj ne volas vidi ke internacia helplingvo estas nepre necesa. Sed ankaŭ esperantistoj faras nun pli oftajn ol dum la lastaj 5 jaroj vojaĝojn, el Polujo Ĉeĥoslovakujon, el Jugoslavio Germanaŭstrion kaj aliajn. Dum la vojaĝo ofte ili renkontas esperantistojn, sed pri tiaj ofte tre interesaj okazaĵoj kies publikigo malfermus al la neesperantistoj ilian miopan vidadon aŭ pli ĝuste ne-vidadon, nenion ili sciigas al la redakcioj, eble hontante pro sia nesufiĉe bona kaj lerta stilo.

Per tiuj ĉi kelkaj vortoj mi volus instigi la esperantistojn, kiuj tre ŝatas skribadi por esperantaj gazetoj — tradukaĵojn de antaŭmilitaj noveletoj (kiu ilin legas eble la est. redakcio faros enketon intersiaj legantoj), ke ili komencu iom modernigi aŭ alivorte, konformigi sin al la novaj tempoj, rakontante al si reciproke pri la kurantaj interesaĵoj, anstataŭ — »pri la pasintjara neĝo.«

Precipe gravaj estas tiaj raportoj en la nuna, tiel skeptikriĉa tempo, ĉar ili povas doni al la esp. propagandistoj novan, tre bezonatan fonton da argumentoj kaj bataliloj por Esperanto.

Leo Turno.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Malgaja jubileo. La 8. Aŭg. forpasis 35 jaroj de la tago, en kiu mortis Dro. Miroslav Tyrš, unu el la fondintoj de la ĉeĥa gimnastika kaj nacifendata organizaĵo »Sokol«. Lia frakasta korpo estis tiam trovita en la kataraktoj de Aach, proksime de la vilaĝo Oetz en Tiroliaj Alpoj, kie li kuracis sian brustmalsanon.

Germana universitato en Praha havas nunjare pli multe da studentoj, ol en la jaroj antaŭaj. Plej multajn aŭskultantojn havas la kuracista fakultato. Multnombre aliĝis tie ankaŭ la Magiaroj el Slovakio. La nombro de studentoj antaŭ la milito daŭre malaltigadis. La nuna stato estas la kaŭzo de la novaj politikaj ĉirkaŭstancoj. La juna respubliko prezentas bonajn esperojn por la estonteco kaj la bela ĉefurbo allogas la studentojn.

La kongreso de delegitoj de karpata Rusio, aranĝita de la Karpatura Nacia Konsilantaro, okazis la 9. okt. en Uĝhorod. La kongreso esprimis la volon plenumi ĉiujn devojn al la Ĉeĥoslovaka respubliko kaj instrui la popolon pri tiu ĉi ŝtata civitaneco, ĝi samtempe postulis de la registaro kunlaboron por akceli la nacian klarecon kaj ekonomian bonstaton en la Karpata Rusio. La kongreso konstatis, ke la nuna

registaro havas plenan konfidon de la karpatarusa nacio.

»**Bohema koro**«. La 12. okt. antaŭ du jaroj estis fondita en Praha la societo »Bohema koro« (České srdce) kun la celo helpi al malriĉaj bohemiaj infanoj, kiuj en tiu tempo multe suferis pro malsato. En tiu ĉi societo, kiu baldaŭ disvolvis sian savlaboron tra ĉiuj bohemiaj landoj, centriĝis la peno de la tuta tiam terure suferanta nacio: savi la infanojn de la morto pro malsato. Vere sennombraj estas la infanoj, kiujn la societo savis. La »Bohema koro« ekzistas ĝis nun, ĉar la vivkondiĉoj en la ŝtato ĝis nun ne estas kontentigaj.

Legianoj kontraŭ bolŝevistoj. La 17. okt. revenis parto de ĉefaj legianoj el Siberio. Okaze de ilia solena akcepto en Praha esprimis unu el ili la postulon de ĉefa siberia armeo, ke oni senprokraste arestigu la iniciatintojn de la ĉefa bolŝevismo Muna kaj aliajn, kaj gardu ilin, ĝis la reveno de la siberia armeo, kies tribunalo poste ilin juĝos. Oni kulpigas ilin el diversaj krimoj kontraŭ la membroj de la siberia armeo, kiujn ili faris dum sia vivado en Rusio. (En Siberio vivas ĝis nun ĉirkau 70.000 da ĉefaj legianoj, kiuj tie atendas sian transporton al sia patrujo. — Muna kaj tri aliaj bolŝevistoj estas jam de kelkaj semajnoj en malliberejo.)

Andrej Hlinka, katolika pastro en Ružomberok, Slovakio, kaj deputito de ĉeĥoslovaka Nacia parlamento kredis, ke li havas kapablojn por esti ministro. Sed en la respubliko oni regas sen li kaj pro tio li ne estas kontenta kun la aranĝo de la respubliko. Li malamas la respublikon eĉ la unuigita ĉeĥo-slovakano, la frateco eĉ la travivitaj naciaj turmentoj de ambaŭ gentoj estas por li sensignifaj kaj li nun penas disbati kaj renversi tion, kio estas por la bona prospero de la ŝtato nepre necesa: la harmonion ĉeĥoslovakano. Li misuzas la religiecon de siaj paroĥanoj instigante ilin al malamo kontraŭ Ĉeĥoj. Por atingi sian celon: malutili al la respubliko, ĉiu rimedo estas al li bona. Kun helpo de polaj oficiroj en Varsovio li forveturis en Italio kaj Francio por tie prezenti protestojn kontraŭ la »subpremo, kiun la Slovakoj devas toleri en la Ĉeĥoslovaka respubliko«. La celon por kiu li entreprenis la vojaĝon li ne atingis, kaj certe li ankaŭ ne sukcesos forigi la konkordon inter Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Estas ja vero, ke en Slovakio estas nuntempe multaj ĉefaj oficistoj, sed ili ne estis senditaj tien kun la intenco forigi la slovakajn kulturon kaj religion aŭ subpremi la slovakajn idiomon (la slovakaj lingvo estas idiomon de la ĉeĥa), sed ĝi okazis sole pro tio, ke la dum mil jaroj subpremitaj Slovakoj ne havas sufiĉe da inteligentulo. Kontraŭe, la Ĉeĥoj tre amas la Slovakojn, kion pruvas la fakto, ke la ĉefaj virinoj komencas sin vesti laŭ la slovakaj naciaj kostumoj, slovakaj manlaboraĵoj kaj iliaj produktoj estas de ili tre volonte aĉetataj, la ĉefaj revuoj kaj gazetoj alportas tre ofte artikolojn pri la slovakaj kulturo, kaj en urboj oni aranĝas kursojn de la slovakaj idiomon. — Andrej Hlinka estas malbona spirito de la ĉeĥoslovaka reciprokeco.

La restoj de »Betlémská kaple«, la preĝejo en kiu predikadis Majstro Jan Hus estis tro-

vitaj antaŭ du semajnoj. La longa serĉado estis kronita kun plej granda sukceso. Estis konstatite, ke la preĝejo ne estis tute ruinigita, sed ke la fundamentoj kaj parto da muroj estis uzitaj ĉe konstruado de novaj domoj. Sur Betlémské náměstí (urbplaco en Praha) en la domo no. 7., en la laborejo de fumajisto Štípek estis post negranda laboro trovita niĉo kaj poste belega gotika arko de la pordo. Post forigo de parto da muro en apuda ĉambro oni trovis bone konservitan gotikan fenestron kaj jen oni spertis, ke la malnova sakristio de la preĝejo estas konservita. Super la sakristio estis loĝejo de la Majstro, el kiu li venadis direkte en la preĝejon. La aliajn restojn de la preĝejo oni trovis en la korto de la germana teknika lernejo. La laborojn oni daŭrigas.

* DIVERSAĴOJ. *

Al la morto de Dro Schulhof, kiu tiel antaŭ tempe kaj ne atendite forlasis niajn vicojn, ni sciigas la jenon: La funebraj ceremonioj okazis la 20. de aŭg. en Praha en Patologia instituto, kie nia neforgesebla amiko kaj kolego mortis. En ĉeesto de delegitoj de Prahanaĵ kluboj: Esp. klubo, Fraŭlina rondeto kaj Verda stelo kaj de la Esp. klubo en Pardubice adiaŭis la mortinton s-o. Aug. Pitlík per sia funebra parolo. La kadavro de Dro. Schulhof estis poste transportita al Liberec por kremacio. Dumvoje la vagono haltis en Pardubice kaj ĉi tie okazis la 21. aŭg. posttagmeze funebra ceremonio antaŭ la ĉerko, kiu restis en ornamita vagono. Krom la familio de la mortinto ĉeestis granda aro de liaj personaj amikoj kaj konatoj. La esperantistaro partoprenis plej parte. La soleno komencis per kanto de kantista ĥoro, post kiu sekvis kelkaj paroloj de amikoj kaj klub-representantoj. Inter ili parolis esperante s-o. direktoro Poppe, kiu en la nomo de Esp. klubo de Pardubice adiaŭis la altŝatatan samideanon. La imponanta ceremonio finiĝis per kantado de ĉeĥa nacia himno Kde domov můj? — Pri la morto de Dro. Schulhof raportis ĉiuj ĉefaj bohemiaj tagjurnaloj.

Ministro Habrman en la esperanta ekspozicio. La junularo de soc. dem. partio en Doudlevec apud Plzeň aranĝis dum la lasta semajno de julio en la loka lernejo ekspozicion kun tre bele kaj riĉe preparita esperanta fako. La ekspozicio estis solene malfermita en ĉeesto de ministro por instruado kaj nacia kulturo s-o. Habrman, kiu traირante la ekspozicion, antaŭ ĉio vizitis la esperantan fakon, kie li kun vera intereso informiĝis pri la nuna stato de esperantista movado, kaj esprimis sian surprizon vidante la amasojn da libroj, gazetoj, gvidlibroj ktp. atestantaj la vivecon de Esperanto. Interparolante kun la ĉeestantaj esperantistoj li diris, ke la ministerio preparas planon pri enkonduko de Esp. en komercajn lernejojn. La esperantan fakon de la ekspozicio vizitis ankaŭ la urbestro de Plzeň, deputito Luděk Pík, kiu ankaŭ esprimis admiron al la disvolvigo de esp. movado. Rimarkinde estas, ke s-o. urbestro Pík interesiĝis sole pri la esp. fako,

kaj aliajn partojn de la ekspozicio li ne vizitis.

La Esperanto-bohema vortaro kum mallonga gramatiko esperanta aperis. Ĝis la fino de tiu ĉi jaro ĝi kostos ĉe nia administracio broŝurita Kč 4.—, bindita en verda tolo Kč 6.80. Post la nova jaro ĝi kostos Kč 5.— kaj 8.—. Rekomendu ĝin ĉie kaj faru opajn mendojn. Post kiam ni disvendos parton de la eldonita kvanto, aperos la lernolibro por bohemoj. — Samtempe ni eldonis broŝureton kun mallonga esperanta gramatiko. Ĝi estas represita el la vortaro kaj taŭgas tre bone por la propagando. Ĉar por ĝi oni uzis la komponaĵojn de la vortaro, estas ĝia prezo tre malalta: ĝi kostas 20 helerojn.

Konkurso de B. A. E. La ekzamena komisiono de Boh. Asocio Esperantista en sia kunveno la 27. V. konstatis, ke el la sep senditaj laboroj neniu plene kontentigas la altajn postulojn de la konkurso. Tamen la laboro kun la devizo »Neniu instruita falis teren« multe superas la aliajn pro la efektive klara stilo kaj sola meritita la premion. La komisiono povas kun ĝojo konstati, ke ĉiuj partoprenintoj montris tre bonan konon de esp. gramatiko kaj vortaro, kaj ke ili tre serioze penas fariĝi bonaj stilistoj. Ĝenerale oni povas konsili al ili atenti pli grandan internaciecon de la vortaro kaj dirmaniero. Ĉar la aŭtoro de la premiita laboro ne aldonis sian adreson, li estas petata komuniki ĝin al so. Stan. Kamaryt, profesor ŝtátnej reálky en Bratislava, por povi ricevi la premion. La komisiono varme dankas ĉiujn partoprenintojn, kiuj pruvis komprenon por serioza lingva laboro kaj esperas, ke ili, kvankam ne rekompencitaj hodiaŭ, atingos rekompencon la venontan fojon. La dua konkurso estos anoncita en la venonta numero de »La Progreso«.

Kora Nobelego. So. Železný, la ĝisnuna prezidanto de tiu ĉi asocio ekŝiĝis kaj sendis la posedaĵojn de la asocio: Kč. 80.90 al la delegito de K. N. so. Kubásek en Plzeň. Tiu ĉi proponas donaci la tutan sumon al la malšana, volapükisto-esp. kaj disigi la senutilan asocion. La membroj de kora Nobelego bonvolu decidi pri tiu ĉi propono ĝis la fino de tiu ĉi jaro.

Idistoj kaj ni. Dume en kelkaj lokoj niaj samideanoj ripozas, kvankam la nuna tempo estas plej konvena por akceli nian movadon, rekomencas idistoj sian sekretan eĉ publikan subfosan laboron. Laŭ sia, al ni jam de longe konata kutimo, ili venas al niaj samideanoj por atentigi ilin pri »supereso di Ido« kaj forlogi ilin de nia movado, kaj al tiuj, kiuj ĝis nun ne partoprenis mondlingvan movadon ili penas inokuli malamon kontraŭ Esperanto. Tiel okazis ankaŭ post kiam ni prezentis al la Ministerio por instruado nian proponon pri enkonduko de Esp. en la lernejojn. Ankaŭ tiam ili alrapidis per siaj mensogaj atakoj por nuligi nian penadon. Ni promesis silenti pri la al ni sciigitaj detaloj ĝis la solvo de nia postulo, tiam ni prezentos al nia legataro novan bildon de idista honesteco. La ŝiigoj kiujn ni ricevas al ni pruvas, ke la idistoj preparas novan betalon kontraŭ Esperanto. Iliaj senĉesaj malvenkoj ne donis al ili ankoraŭ pru-

denton, do ni daŭrigu. ni estas ĉiam pretaj. Se en iu loko la laboro de niaj samideanoj estas atakata de idistoj, oni neforgesu nin informi pri tio. Se eble oni sendu al ni ankaŭ la presajojn, kiujn nun uzas la idistoj en batalo kontraŭ Esperanto.

Imitinta ekzemplo. Nia vigla moravia samideano fino. A. Janalíková en Bystřice p. H. prezentis al la Distrikta lerneja konsilantaro en Holešov peton pri permeso instruadi Esp. en la 3. klaso de la burĝa knabina lernejo en Bystřice p. H., aldonante, ke tiun ĉi laboron ŝi faros tute senpage. Nun ŝi informas nin pri la ricevita permeso, rekomendante ĉi tiun metodon al siaj esp. kolegoj. Efektive, ŝia modelo povas plej rapide enkonduki Esp. en la lernejojn.

Jubileo. So. Tomáš Baťa, posedanto de ŝuofabrika en Zlín festis en la forpasinta septembro la 25an jubileon de sia laboro. La jubilo estas modelo de praktika kaj energia viro, kiu per sia propra laboro, ne per iu heredo aŭ protekto, atingis gravan pozicion en nia industrio. En 1904 li foriris en Amerikon, kie li kiel simpla laboristo laboris en la centroj de amerika ŝuoindustrio studante kaj observante la metodojn de la fabrikado. De tie li foriris en Anglion kaj Germanion por tie kompletigi siajn sciojn. Reveninte hejmen li komencis labori laŭ la akiritaj spertoj kun tia sukceso, ke lia fabrika nun estas la plej granda de tiu speco en la Ĉeĥoslovaka respubliko kaj ĝiaj produktoj estas pro sia bona kvalito ĉiuflanke ŝatataj. Ankaŭ nia movado havas en li sian amikon.

Esperanto kaj komerco. La bohema komercista gazeto »Obchodní organizátor« enpresas artikolojn pri Esperanto. En la n-o. 7. de la nuna jarkolekto aperis artikolo pri instruado de Esp. al la infanoj, tradukita de prof. Fridrich el la januara kajero de »The British Esperantist« (1917).

Al la Instruistoj kaj profesoroj esp.! Por koni la nombron de la esp. geinstruistaro en nia respubliko mi petas: kolegoj, sendu vian adreson al del de U. E. A. B. Ludvík, uč. m. šk. en Kostelec n. č. Lesy. — Oni informos fremdlandon, eldonos adresaron, postulos instruadon de Esp. en lernejoj k. a.

Peto pri adresoj. La infana ilustrita gazeto »Malý Čtenář« aperigas denove (jam la sepan jaron) esperantan rubrikon. Ĉar ĝi enhavas krom la gramatika kaj kronika partoj ankaŭ korespondan fakon, mi senpage enpresas la adresojn de fremdaj (nebohemiaj) junaj korespondantoj. La adresojn oni sendu al f-ino. Julie Šupichová, instruistino kaj del. de U.E.A. en Praha II., Malá Štěpánská ul. 6.

Edziĝo. So. Stan. Stejskal, prov. profesoro en Praha kaj f-ino Berta Chramostová festis sian geedziĝon la 12. de julio en Kamenice n. Lipou. — (Ni esprimas al la junaj geedzoj nian sinceran gratulon! La redakcio.)

Salutoj. S-o. Jan Mráz el Praha reveninte el Francio, tutkore salutas ĉiujn samideanojn. Lia adreso: Mráz Jan adj. Legionářský pluk z Francie čís. 23., rota III. Polní pošta 22. — S-o. Ráž, del. de U. E. A. kaj instruisto el Beroun, t. t. ĉeĥoslovaka legiano en Rusio kore salutas siajn korespondantojn kaj amikojn.

Al niaj korespondantoj. Multaj samideanoj el fremdlando jam aliĝis al ni por la tasko de korespondanto de nia gazeto kaj kelkaj el ili eĉ sendis diversajn raportojn. Ĉiujn ni atentigas, ke ili ne sendu sciigojn pri la aferoj, kiujn la presoficejoj telegrafas en ĉiujn partojn de la mondo, kaj kiuj tial ankaŭ en nia lando estas bone konataj. Oni ĉiumonate sciigu al ni la ĝeneralan politikan kaj ekonomian staton de sia lando laŭ la ekzemplo, kiun ni donas en nia rubriko «Ĉeĥoslovakio», sed ne sendu notojn pri renversitaj flugmaŝinoj, pri strikoj k. t. p., ĉar post ilia alveno ili estas senvaloroj, ĉar ili jam malnoviĝis. — Konvenajn raportojn ni enpresos de post la nova jaro en La Progreso aŭ transdonos ilin al la ĉefaj ĵurnaloj, por dokumenti per ili la utilon de Esperanto en ĵurnalismo.

KRONIKO.

Praha. La movado videble plivigliĝas. La kunvenoj de la Esperantista klubo (unuiĝinta klubo kaj Societo) okazas ĉiulunde en kafejo «Union» kaj estas vizitataj ne nur de multaj novaj adeptoj, sed eĉ de malnovaj espistoj, kiuj denove revenas al la movado, vidante, ke oni forigis la malpacon kaj laboras konkorde. — La 21. V. la klubo aranĝis paroladon de prof. Stejskal: Pri la vivo kaj laboro de E. K. Mačan. La 70 ĉeestantoj atente aŭskultis la interesan paroladon. La kantoj, bele prezentitaj de fino. Máňa Kutová, montris la grandan talenton de la blinda komponisto, kiu mem tradukis la kantojn en Esperanton. — La 23. VI. vizitis la klubon so. Cottrell el Washington, membro de la amerika misio. — La 8. XI. komencis esp. kurso.

Plzeň. Popola Universitato malfarmis la 20. de okt. novan kurson de Esperanto por komencantoj. Esperanto estas daŭre enkondukita en la instruon planon de tiu ĉi grava instituto. — Laborista societo Esp. malfarmis kurson por komencantoj. Instruas ĝia prezid. so. J. Pech. — Societo de komercaj helpantoj «Česká Obchodnická Beseda» aranĝis la 22. okt. paroladon de so. Fr. Kavan, admin. de «La Progreso», pri graveco de Esperanto en la komercaj rilatoj. Tiu ĉi societo havanta kelkajn centojn da membroj aranĝos per komenco de januaro kurson de Esp.

Plzeň—Doudlevec. Esperantista klubo estis tie ĉi fondita.

Pardubice. Esperantista Rondeto aranĝis la 27. aŭg. membran kunvenon, dum kiu oni memoris la mortintan prezidanton dr. Schulhof. So. ing. Berger el Moravany menciis per bela parolo la meritojn de la mortinto. La Rondeto helpas al la eldono de poemoj kaj de aliaj verkoj de sia mortinta prezidanto. Anstataŭ florkronon sur la ĉerkon la Rondeto donacis Kč 50.— por subteni la malsanan volapükiston-esp. — La nova prezidanto ne estas ankoraŭ elektita. La Rondeto decidis aranĝi kurson de Esp.

Červený Kostelec. La Esperanta Unuiĝo, kiu jam de la jaro 1910 sub la gvidado de senlaca sino. Berta Kejzlarová kunvenas regule ĉiun merkredon je la 8. vespere, aranĝis dum la pas-

inta libertempo ekskursojn al Ratibořice kaj Hronov n. M. — La 20. de sept. ĝi aranĝis la 1. amuzvesperon bone sukcesintan.

M. Schönberg. So. II. Tutsch aranĝis tie ĉi la 17. aŭg. bone vizititan paroladon pri Esperanto. Num li aranĝas kurson por 40 partoprenantoj.

Zlín. Esperantista klubo kaj la gimbastika societo «Sokol» aranĝis la 8. de okt. paroladon pri Esperanto de fino. Ant. Janalíková, instruistino el Bystrice p. Host. — La movado esperantista havas tie ĉi modelan pioniron en la persono de so. Frant. Kesler, presejstro ĉe la firmo T. & A. Baťa, kiu kun admirinda lerteco gvidas nian aferon. Ke lia laboro ne estas senfrukta, tion pravas la fakto, ke tie ĉi estas vendataj daŭre 100 ekz. de «La Progreso», kvankam la urbo ne estas granda. — Kursoj de Esp. komencis la 14. okt. — Ĝojige estas, ke ankaŭ en burĝa lernejo estas Esp. instruata.

Ružomberok. La 1. de sept. okazis tie ĉi parolado pri Esperanto de so. V. Tuček. La 10. de la sama monato komencis kurso kiun partoprenas 50 lernantoj. Ankaŭ la kurson gvidas so. Tuček.

Žilina. Esperantista grupo estis fondita tie ĉi. La fondintoj estas soj.: Stefan Tadlenek red. de «Právo Lidu», Dro. Hofmann kuracisto, Dro. Marcel Friedner advokato, Dro. Teod. Ring advokato, Arnold Kardoss eksnotario, Ján Spriska presejposedanto, Kar. Zahradník presisto, Stefan Tyrdy komercisto, Ján Zábkaĵ serurmastro, L. Janza, Lad. Kemény studentoj kaj nia meritiĉa samideano so. Popper.

Bystřice p. Host. Laŭ postulo de fino. A. Janalíková permesis la Distrikta lerneja konsilantaro, ke ŝi instruu Esp. unu horon semajne en la 3. klaso de burĝa knabina lernejo.

Vieno. La Vienaj samideanoj rekomencis siajn kunvenojn post preskaŭ kvinjara interrompo. Ili kunvenas ĉiuvendrede je la 7. vesp. en «Národní dům». Wien XV., Turnerg. 9. — La 18. de julio invitis la deputito de Viena komunumo so. Klimeš kaj so. Franc la ĉefajn esperantistojn al la unua kunveno, kiun partoprenis ankaŭ so. dir. Kaftan, prezid. de Esp. soc. «Danubio». Oni decidis rekomenci la propagandon inter la Vienaj Ĉeĥoj. Samideanoj bonvolu helpi al la nove restariĝinta societo per presajoj kaj propagandiloj kaj sendu ilin al so. R. Čech, Wien IX./1., D'Orsayg. 7-23.

Fr. V. Krejčí:

Oni ne trovas tuj la nacion, en kies vivo la libro havus pli gravan rolon kiel ĉe ni Bohemoj. Se oni diras, ke la sortoj de la plimulto de la nacio estis faritaj per glavo, pri ni oni devas diri, ke niaj sortoj estis evoluigitaj sub la influo de la libro. En tiu tempo, kiam ni nomas la plej granda tempo de nia pasinteco, oni traktis pri la libro kaj pri la komentario kaj senco de la plej glora libro de la mondo.

Lau sortoj de la bohema libro oni mezuras la profundecon de la bohema sufero kaj la deĝeneracon en la plej malbonaj tempoj.

Sed la libro vekis nin denove kaj la admirinda reviviĝo de la nacio estas ĝia merito.

Trad. A. Hejnová.

J. SUPICHOVÁ:

ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

La sturno.

Maljuna paŝtisto vivis sola en la vilaĝo; li ŝatis birdojn kaj havis sturnon, al kiu li instruis elparoli kelke da vortoj. Kiam li diris: »Sturneto mia, kie vi estas?«, la birdo respondis: »Tie ĉi!« — Karlo, fileto de najbaro, ankaŭ tre ŝatis la birdon kaj ofte venadis, por vidi ĝin. Foje li eniris dum la foresto de la paŝtisto, ekkaptis la birdon, enŝovis ĝin en sian poŝon kaj intencis forkuri kun ĝi hejmen. Sed tiu-momente revenis ankaŭ la paŝtisto, kiu, por fari plezuron al la infano, ekkris: »Sturneto mia, kie vi estas?« La birdo respondis el la poŝo le Karlo: »Tie ĉi!« — De tiu tempo Karlo ne plu vizitadis la paŝtiston.

Demandaro (respondu ĝin buŝe kaj skribe!):

1. Kiu vivis en la vilaĝo?
2. Kia estis la paŝtisto?
3. Kion aŭ kiun li ŝatis?
4. Kion li havis?
5. Kion li instruis al ĝi?
6. Ĉu la sturno sciis paroli?
7. Kiel vokis lin la paŝtisto?
8. Kion respondis la birdo?
9. Kiu estis Karlo?
10. Kion li ankaŭ ŝatis?
11. Kien venadis Karlo?
12. Kiu foje forestis?
13. Kiu venis en lian loĝejon?
14. Kion li intencis?
15. Ĉu li sukcesis?
16. Kiu ĵus revenis?
17. Kiun li vokis?
18. Kie troviĝis la sturno?
19. Ĉu Karlo ankaŭ poste vizitadis la maljunan paŝtiston?
20. Kiel?

SCIIGO AL BOHEMAJ SAMIDEANOJ!

Pro grava okupo mi **dum kelka tempo ne povas** daŭrigi mian poresperantan laboron kaj respondi la informopetojn.

Julie Supichová en Praha.

ATENTIGO.

Per cirkulero de Aprilo 1919, ni sciigis, ke la sumoj senditaj al la Deko Kongreso por mendoj estas repagotaj al la Kongresanoj post malpliigo por la elspezoj faritaj de la diversaj Agentejoj.

Post nova ekzameno de la demando kaj esploro de la kalkuloj ni konsideris, ke ni povas uzi la renton de la kapitalo, kiun ni havis je nia dispono dum la militperiodo, por repagi la diritajn monsumojn sen ia dealkulo kaj preni sur nin la sendelspezojn de la dokument-kaj poŝtmandatoj.

Ni ankaŭ pridiskutis la demandon pri monŝanĝo, kaj decidis ĉar la pagoj estas faritaj al la Kaso de la Kongreso per rankoj (vidu dors-flankon de la aliĝiloj,) ke ni ankaŭ repagos per frankoj.

La Kongresanoj, kiuj intencas oferedoni tute aŭ parte al la Kongresa Kaso aŭ al la Franca societo por propagando de Esperanto la sumon al ili ŝuldatan bonvolu sciigi nin pri sia intenco.

Ni petas la Kongresanojn ĉiam memori la numeron de ilia kongresa karto.

Loka Organiza Komitato
de la Deko Kongreso de Esperanto
Paris, 51, Rue de Clichy.

DANKESPRIMO.

Laborista societo esperantista en Plzeň esprimas koran dankon al ĉiuj samideanoj, kiuj helpis al la aranĝo de la Esperanta ekspozicio en Doudlevec apud Plzeň. Ĉefe ni dankas al la sendintoj de diversaj presajoj, kiuj per ili helpis pliriĉigi nian kolekton. Ili estas: so. dir. E. Batěk el Ríčany, so. Leo v. Munster el Haag, F. Němec el Karlsbad, Leonard Newell el London, Esperantista Klubo en Plzeň kaj multaj lokaj eĉ fremdaj samideanoj.

Josef P e c h, prezidanto.

KOMERCA PROPAGANDADO.

La »Komitato por komuna komerca lingvo« en Lodź, (Polujo) kies celo estas propagandi E—on inter la komercistaj rondoj kaj faciligi la eksterlandan komercadon pere de E—o, sin turnas al estimataj gesamideanoj en ĉiuj landoj kun varma peto alsendi la nomojn kaj adresojn de ĉiuj esperantistaj aŭ esperantemaj firmoj.

La K. por K. K. L. ankaŭ tre dezirus havi reprezentantojn en gravaj komercaj centroj, kies celo estus prizorgi por lodzaj firmoj ofertoin kaj ankaŭ fari tradukojn de esperantaj korespond-aĵoj ricevotaj de neesperantistaj firmoj en sia distrikto. Interesuloj bonvolu sin turni al Hon. Sekr. I. Ĥimoviĉ, Lódź (Polujo), Długa 90, Esper. Societo.

ESPERANTO INTER BLINDULOJ.

La legantaron de »Progreso« interesos eble kelkaj ciferoj koncernantaj la porblindulan monkolekton, kiun oni nature ne ĉesigas per ĉi-tiu raporto, ĉar la plua mono estos nepre necesa por ke la konstanta eldonado de porblindula esperanta aldonaĵo de »Zora« estu garantiita.

Ĝis nun 44 blinduloj abonis esperantan lernolibron pokajere kaj reliefe. La monkolekto aranĝita antaŭ kelkaj monatoj kaj la abonpagoj havigis al entreprenantoj sumon 331 K 95 h, en Městská spořitelna en Praha troviĝas sumo 263 K 16 h (estinta monkolekto por blinduloj volontaj partopreni Parizan kongreson). Do oni disponas nun per sumo 595 K 11 h uzota al porblindulaj presentreprenoj.

Stan. Stejskal.

RICEVITAJ GAZETOJ.

Amerika Esperantisto (Jul.—Aŭg.), Argentina Esperantisto (Junio—Jul.), The British Esperantist (Julio), Eklezia Revuo (Julio), La Espero (Aŭg.—Sept.), Esperanta Finlando (Julio—Aŭg.), Esperanto UEA. (Oktobro), Esperanto Bahia Blanca (Aŭg.), The Esperanto Monthly (Sept.), Germana Esperantisto (Okt.), Hispana Esperantisto (Majo), La Holanda Pioniro (Sept.—Okt.), Itala Esperantisto (Aprilo—Julio), Le Monde Esperantiste (Aŭg.—Sept.), Nederlanda Katoliko (Aŭg.), Svisa Espero (Aŭg.—Sept.), Le Travailleur Esperantiste (Oktobro), La Unuigita Tuthomaro (Oktobro), Autaŭen (Sept.).

Novaj gazetoj.

»La Esperantisto«. Subtitolo: Organo de Esp. Universitato Popola. — Dediĉita al la interna ideo de l'Esperantismo. — Kvarpaĝa, 42×29 cm, jara abono 2 aŭstriaĵ kronoj, aperos monate. Redakcio: Wien II./1., Poŝtofiĉejo 34., eldonanto: Salomon Kornfeld, resp. redaktoro: Dr. Ard. Popolan. — Jen prezentigas al ni belaspekta gazeto kun interesa enhavo al kiu ni sincera deziras longan daŭron. La tuta aranĝo de la gazeto montras la supozon de la eldonantoj, ke ĝi farigos organo de tutmonda esperantistaro. La proksima estonteco montras, ĉu ili ne eraris. Rimarkinda estas la prezo de la gazeto: du kronojn jare! Ĉu estas eble en la nuna tempo por tiu ĉi prezo eldoni dum la tuta jaro la gazeton? Kaj tamen la eldonantoj esperas esti finance tiel fortaj, ke oni akceptas nur anoncojn, kiuj senpere koncernas Esperanton! Estas klare, ke la eldonantoj ne sufiĉe funde pripensis ĉi tiun fundamentan aferon, kiu ĉefe destinas la prosperon de la gazeto. Esperu, ke la gazeto estos subtenata per donacoj de entuziasmoj ne estas bone, ĉar similaj fontoj ĉiam baldaŭ elsekiĝas. Internacia gazeto devas havi fortan financon bazon, kiu plene garantias ĝian daŭran ekziston, kaj eldonante la gazeton oni devas konsideri, ke la malaperanta gazeto alportas al nia movado pli da malutilo ol da utilo alportis ĝia apero. Ni kredas, ke ankoraŭ sufiĉis al ni nia »Esperanto«, unusola centra organo, al kies bona prospero ni ĉiuj devas labori, ĉar ĝi estas la reprezentanto de nia movado.

Internacia Komerca Revuo«. 20. paĝa, kun kovrilo, 15×23 cm., jara abono Fr. 5.—, aperos monate. Adreso: Zürich (Svisio), Hauptpostfach 6104. Redaktoro: Do. Hj. Unger. — Jam la titolo de la simpatia kaj bele aspektanta revuo montras, ke ĝia enhavo rilatos komercajn kaj industriajn aferojn. El la enkonduka artikolo ni sciigas, ke ĉiu kajero enhavas nacilingvan artikolon kaj la saman tradukon de la »Kroniko Esperanta«, kiuj servos por celoj propagandaj. En ĉiu kajero oni uzos alian lingvon nacian: angla, franca, germana, hispana, holanda, itala, portugala, rusa kaj sveda. Oni komencis per la angla, enpresante la artikolon »The League of Nations' Language«, en kiu oni parolas pri la historio de la lingvo internacia, pri Esperanto, pri ĝia neceso por la ligo de la nacioj kaj pri la konata deklaro pri ĝi, akceptita de la internacia konfe-

renco de la Asocioj por la Ligo de la nacioj. La unua kajero estas tre riĉenhava, ĝi traktas ĉefe pri la aferoj komercaj kaj montras, ke la »I. K. R.« estos tre bona faka gazeto.

»Universo«. Organo de internacia klubo de kolektantoj »Universo«. 8 paĝa, 14×22 cm. Adreso: München, 8. 50, Dietramszellerst. 10. — Jen bona gazeto por ĉiuspekcaj kolektantoj.

SUFERO.

Ne malbenu suferon, ĝi estas ja la vojo al ekkono de vera, pli ĝoja vivo, kaj ofte ĝi estas inspiro al la plej nobla ago.

Homoj, kiuj trabatas sin per la plej kruda vivo, tio estas jam granda povo — povo de ekkono; kaj la homoj, kiuj plej multe suferis, posedas profundecon de vera sento, de vera amo al la proksimumo, ili posedas pro la suferoplena vivo grandan spertecon kaj sekve ankaŭ veramon.

Esp. Marie Kubásková.

Fr. Krejčí:

Por plenumi la regulan devon, por valore agadi en diversaj fakoj oni ne bezonas ŝanĝi la nacieron, kaj prospero de la propra nacio ne estas baro al la plej idealoj tuthomaraĵoj.

Trad. A. Hejnová.

Fr. Mareš:

Valoro de la nacio konsistas el la valoro de la vero, kiu estas idealo aŭ celo de ĝia viva kreado, kaj kiu aldonas la sencon kaj per tio ĉi ankaŭ la motivon al ĝia vivo.

Trad. A. Hejnová.

Jan Klecanda:

Kiel ni amas nian naskiĝan dometon, ĝojante, ke ĝi ankoraŭ longe daŭros kiel ni amas la arbon en la ĝardeno, kiun nia patro aŭ ni mem plantis kun la sopiro, ke ĝi ankoraŭ multe da jaroj kresku kaj donu fruktojn, tiel ni amas nian tutan karan patrujon, kaj nia arda deziro estas, ke ĝi daŭru plu en sia beleco.

Sed tiu ĉi amo ordonas al ni streĉi ĉiujn fortojn, porke nia patrujo grandiĝu, pliboniĝu ĉiudirekte, por ke ĝi garantiĝu la feliĉan, kontentan vivon al siaj loĝantoj en la anima kaj materia bonstatoj.

Trad. A. Hejnová.

Fr. Drtina:

En la demokrata ŝtato ĉiuj membroj de la nacio devas partopreni tion, kio konstruas la plej valoran, propran posedaĵon de la homaro. Tra ĉiuj regionoj kaj en ĉiuj partoj de la nacio devas disvastiĝi la vera klereco, tiu klereco, kiu ne estas verko kaj profito de kelkaj homoj, la klereco, kiu koncernas la kapon, koron eĉ manojn, la klereco, kiu farigos la beno de la tuta nacia societo. Tio estas substanco de la bohema kultura demokracio.

Trad. A. Hejnová.



Cigared-papero

Cigared-tubetoj

WALDES & KO.

Praha-Vršovice (Bohemio)

El la redakcio. Kaŭze de la milita dejoro de nia resp. redaktoro malfruiĝis la apero de la oktobra kajero de nia gazeto kaj tial ni estis devigitaj eldoni denove duoblan kajeron. La legantoj bonvolu tion pardoni.

Redakcia leterkesto: So. L. D. Jes, koran dankon.

El la administracio. Longa vico da samideanoj ĝis nun ne pagis sian reabonon por tiu ĉi jaro. Ili bonvolu tion fari kiel eble plej baldaŭ, ĉar pro eldono de la esp.-bohema vortaro estas la bonstato de nia kaso elĉerpita.

DEZIRAS KORESPONDI:

S-c. Charles Price, c/o School of Arts, TOWNSVILLE N. E. Queensland, Australio, — serĉas siajn bohemiajn gekorespondantojn kaj deziras denove korespondi kun ili.

Kuracistoj kaj studentoj de medicino dezirantaj korespondi kun fakulo skribu al: Dr-o. L. A. Steffens, Medical-School, Millard Hall 212, University of Minnesota, MINNEAPOLIS-MINNESOTA U. S. A.

So. Wladyslav Kyak, poŝta Radom, Polio — deziras korespondi kun kuracistoj kaj aliaj spertuloj de diversaj malsanoj.

So. In. Gross, Plzeň, Houškova ul. 32, Ĉeĥoslovakio — interŝanĝas kaj aĉetas esperantajn glumarkojn.

The members of the English Club of Plzeň, Bohemia — wish to correspond with English ladies and gentlemen. Address: English Club of Plzeň, Hotel Waldek, Bohemia.

Informace ciziny Esperantem,

propagaĉni leták, vydaný admin. „La Progreso“, je výbornou pomůckou všem šifitelům Esperanta 1 kus 30 haléřů, 10 kusů 250 K., 100 kusů 20 K. Objednávejte u „La Progreso“, Plzeň.

Bildon de la nacia vivo en Bulgario prezentas la libro de Ivan H. Krestanov:

La Bulgara lando kaj popolo

(128 paĝoj 14×21 cm kun etnografia karto).
Prezo K 6 — aŭ frankite. Ricevebla ĉe la redakcio de La Progreso.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-oficejo

(Ĉeĥoslovanská esperantská kancelář)

Praha III., Nerudova ulice 40, III. p.
(fondita de s-o. Aug. Pitlik)

aranĝas Esperanto-propagandon, informas fremdlandon pri kultura kaj politika celado de la Ĉeĥoslovaka nacio kaj prizorgas informojn pri eksporto kaj importo de ĉiuj komercaĵoj.

Koh-i-noor
BOUTONS PRESSION
Breveté S.G.D.G.
Marque Mondiale

Preambutonoj
Metalbutonoj
Kudrilajoj

WALDES & KO.
Praha-Vršovice (Bohemio)

Objednejte si slovník
Esperantsko-český

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.

Cena brož. Kč 4.—, v plátně vázaný Kč 6'80.

Fremdlandaj esperantistoj abonu

LA PROGRESO

ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Bern, Museumstr. 14.

Se vi deziras havi bonegan internacian gazeton,
abonu :

» ESPERANTO «

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.
MONATA GAZETO REDAKTATA TUTE EN ESPERANTO.

16—20 paĝoj de plej bona teksto.

Enhavo: Artikoloj de ĝenerala intereso pri internaciaj problemoj, socialaj demandoj, geografio, ekonomio, scienco. — Literaturoj. — Esperantismo. — Kroniko. — Tra la gazetaro. — Tra la libraro. — Lingvaj studoj. — Anoncetoj.

Jara abono: 12 kronoj, Luksa eldono: 14 kronoj, pageblaj al administr. de „La Progreso“ en Plzeň, aŭ Sro. Dro. Sós, Tuchlauben 18., Wien.

Senpaga specimeno laŭ peto de la administrejo:

Museumstrasse 14. Bern. (Svisio).

**Via horloĝo iros
precize** se vi ĝin donos por
rebonigi al



Fr. Novák,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj
kaj juveloj. - Vendejo
de esper. signoj de
Esper. klubo en Praha.

Por ĉiu estas bezonega
la ĵus aperinta **BES-a**

Adresaro de l'esperantistoj

el ĉiuj landoj.

Aŭtuna eldono. — Mendu ĝin tuj ĉe:

BOHEMA ESPERANTO-SERVO
Moravany, Bohemio, Ĉeĥoslovakio.

Prezo 2.50 Kč (0.75 Fr. sv.) — Rabato al
societoj kaj vendejoj ĉe opa mendo.

T. & A. BAŤA

ŝuofabriko kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.

Propraj vendejoj:

Praha, Václavské náměstí 32

Brno, Koblížná ulice 24.

Opava (Troppau), Hrnčířská 14

Wien (Viedeň), Taborstrasse 17 a

Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4

Lwów, Akademicka 5

Lódz, Piotrkowska 74

Bratislava (Presburg), Michalovská 5

Przemysł, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.

Mor. Ostrava, nám. 14.

Znojmo, Kovářská 7.

Kroměříž, Komenského

nám. 107.

Přerov, Ferdinand. 15

Šumperk, nám. 27/28

Hodonín, Masarykovo

18

Olomouc, Kinopasáž

Val. Meziříčí, náměstí

Břeclava, Frant. Jos. 17

Nový Jičín, obch. dům

Jedek

Hranice, náměstí

Vyškov, Pánská 10

Svitava, Brněnská 4

Jihlava, Schillerova 5

Uherský Brod, náměstí

163

Kyjov, Komensk. tř. 4

Místek, náměstí 13

Vsetín, Dolní nám. 304

Kojetín, Masarykovo

náměstí

Krňov, Fr. Jos. nám. 12

Frydek, náměstí

Trenčín, nám., budova

gymn. Pisr.

Malacka, Slovensko

Trnava, Hosp. banka

Žilina (Zsolna), Sze-

chenji 209

Nitra, Slovensko

Růžomberok, Slovensko

Užhorod (Kežmark)

Lučenec (Luczivna)

Nové Zámky

Báňská Bystřice

(Besztercebanya)

Košice (Kassa)

Liberec, (Reichenberg),

Schückerstrasse 34

Pardubice, budova

spořitelny

Kolín, náměstí 72

Ústí n./L., (Aussig a./E.)

náměstí 28

Hradec Králové, Palác

Zál. a úvěr. ústavu

Ml. Boleslav, Pražská

ul. 116/1

Jaroměř, Husova tř. 91

Jičín, Velké nám. 60

Čáslav, Palackého 63

Dvůr Králové, nám. 57

Německý Brod, Komen-

ského 153

Turnov, Palackého 145

Plzeň, Žbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šter-

nekova 18

Kladno, Královská 38.

Jindř. Hradec, Palac-

kého 94

Příbram, náměstí 142

Tábor, Třída Čes.-sl.

legií 640

Písek, Riegrovo n. 26

Louňy, Žižkova 305

Náchod, Pražská 63

Klatovy, nám. 170/I.

Karlovy Vary (Karls-

bad), Fr. Jos. tř. 607

Most (Brüx), nám. 82

Amstetten, Viehdor-

ferstrasse 4

Wner. Neustadt (Víd.

Nové Město), Kaiser

Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.